LSG FORUMO nr-o 148 (2013)

Membrogazeto de Ligo de Samseksamaj Geesperantistoj



*Estraranoj en bona etoso*

## PROTOKOLO DE LA ĜENERALA KUNVENO DE LSG DUM LA UK EN REJKJAVIKO

La kunveno okazis la 21-an de julio 2013 ekde la 14.15-a horo en UK-kongresejo en la salono "Dao Anh Kha".

Partoprenis 27 samliganoj kaj gastoj. Prezidis prezidanto Randy Dean kaj sekretario-kasisto Rolf Köhler.

1. La tagordo estis akceptita sen ŝanĝo.
2. Kiel protokolisto sin proponis kaj estis akceptita Ed Williger.
3. Kiel raportisto por la UK-kuriero "Aŭroro" estis akceptita Rolf.

Por gej-lesba ĵurnalo en Atlanto/Usono volas raporti nemembro JeffreyBaxter.

4. La protokolo de la lasta kunveno en Kopenhago estis akceptita.
5. La kasisto Rolf donis ampleksan financan raporton de la ligo. La raporto per voĉdono estis akceptita unuanime. La membrokotizoj restas kiel en la lastaj jaroj (vidu kolofono).
6. Estis larĝe diskutata la tro malofta apero de nia membrofolio "Forumo" pro manko de redaktanto. Finfine ofertis sin John Dumas kiel nova redaktanto kaj estis kun ĝojo akceptita.
7. Randy proponis, ke LSG estu pli bone videbla en la sociaj servoj

**KOLOFONO:**
FORUMO estas informilo por membroj de LSG, la Ligo de Samseksamaj Geesperantistoj

Interrete: http://lsg-esperanto.org

Membriĝo: ĉe la sekretario

kotizoj: 12 € por 1 jaro / 30 € por 3 jaroj / 300 € por dumviva membreco

Prezidanto: Randy DEAN (laprezidanto@gmx.net)

Sekretario kaj kasisto: Rolf KOEHLER (lasekretario@gmx.net) kaj (lakasisto@gmx.de)

LSG, Rolf KÖHLER, Bergstr. 78, DE-01069 Dresden, Germanio

Redaktanto: Wolfgang KIRSCHSTEIN (laredaktanto@gmx.net)

Estraranoj: Harry BARRON (phsb@orange.net) Francis SOGHOMONIAN (fsoghomonian@yahoo.fr) (trio@tio.net) Ed WILLIGER

Sendu abunde kontribuojn por via membrogazeto FORUMO antaŭ la **30-an de novembro 2013** al: laredaktanto@gmx.net aŭ al la helikpoŝta adreso de la sekretario.
***Nepre ne kontaktu la personon sur la etikedo de la koverto. La persono ne estas ligano. Nur pro la favoraj poŝt-tarifoj ni forsendas la gazeton el Ĉeĥio !***

Facebook kaj Google-Plus. Post diskutado la kunveno decidis, transpreni la jam ekzistantan nerajtigitan Facebook-paĝon de nekonantulo (Ed) kaj fondi Google-Plus-paĝon (Randy kaj Cody).
Prizorgantoj de la paĝoj estu Ed (Facebook) kaj Randy (Google-Plus).
8. Landajn LSG-raportojn neniu ofertis.
9. La elektoj de jenaj estraranoj estis unuanime:
Prezidanto kaj prizorganto de nia retpaĝo: Randy Dean (Usono),
Sekretario kaj kasisto: Rolf Köhler (Germanio)
Estrarano pri varbado: Ed Williger (Usono)
pluraj estraranoj: Francis Soghomonian (Francio), Paul-Harry Barron (Britio).
10. Randy proponis rezolucion por honori Islandon pro subteno de samseksamaj rajtoj kaj honorigi la Rejkjavikan urbestron Jón Gnarr, kiu proklamis, ke li volas glaciigi la ĝemeliĝon kun Moskvo pro la malbona traktado de samseksemuloj tie.
La rezolucio estis unuanime kaj kun tre forta aplaŭdo de la ĉeestantoj akceptita.
11. Diversaĵoj: Francis salutis la ĉeestantojn de la malsana Gilbert el Parizo kaj de nemembro Vilhelmo el Kubo. Kelkaj partoprenantoj vespere volas viziti publikan banejon.
La ununura geja gastejo en Rejkjaviko estas "Kiki"-baro.
Pri komuna merkreda ekskurso oni ne decidis, ĉar pluraj membroj jam mendis aliajn ekskursojn.
Randy informis pri invito de islanda gej-lesba organizaĵo "Samtökin 78" al LSG por mardo vespero.

12. La sekvontan ĝeneralan kunvenon LSG planas por la UK en Bonaero 2014, se sufiĉe da samliganoj partoprenos.
13. Tradicia unuminuta silenta omaĝe al forpasintaj LSG-anoj.
14. La kunsido estis fermata.

*Laŭ Ed*



*Estis sufiĉe da intereso por nia jarkunveno*

## LSG EN REJKJAVIKO

En viaj manoj estas la unua postkongresa Forumo. Espereble ĝi plaĉas al vi – viaj reagoj kaj proponoj kiel ĉiam estas tre bonvenaj! Ni bedaŭras la prokraston, sed esperas estontan regulan aperritmon.
Komence de la UK kiel kutime LSG kunvenis en la kongresejo (vidu protokolo). Preskaŭ kvindek gemembroj kaj kelkaj gastoj ĉeestis en la plenŝtopita salono "Dao Anh Kah". Ni vigle diskutis niajn aktualajn temojn. Vi nun povas aliĝi kaj en Facebook kaj en Google-Plus al LSG-paĝoj kaj diskuti ankaŭ tie kun samliganoj kaj nemembroj de LSG. Kompreneble krome nia retpaĝo kaj nia babilejo "Amikaro de LSG" ĉe Yahoo-grupoj pluekzistas.
Agrablan vesperon ni pasigis en la ejo de islanda GLAT-organizaĵo "Samtökin 78". Ĝi situas en la centro de la ĉefurbo kaj estas tre bone videbla pro la ĉielarkaj flagoj ekstere. Estrarano klarigis al ni en angla lingvo (Randy tradukis al Esperanto) la historion de la islanda geja movado. Poste ni povis esplori la ampleksan bibliotekon de la asocio.
UEA-ĝenerala direktoro Osmo Buller skribis poste al LSG kaj gratulis nin (vidu lian mesaĝon).
Verŝajne la plej grandan eĥon ekstere de LSG rezultis nia rezolucio (vidu protokolo). Anglalingva islanda gazeto „The Reykjavík Grapevine” raportis amplekse sub titolo "Conference Guests Wowed By Gay Rights In Iceland". La nova UEA-prezidanto Mark Fettes menciis ĝin en sia rezumo dum la solena fermo de la UK. La retgazeto "Libera Folio" post la kongreso intervjuis nian prezidanton Randy Dean kaj Osmo Buller pro la afero. La artikolo estis multe diskutata.
Kelkaj samliganoj dum ekskursa merkredo komune admiris la tre interesan naturon de la vulkaninsulo. Ĉifoje la ekskursa programo de la UK estis eĉ pli varia ol kutime – celoj estis akvofaloj, gejziroj, glaĉeroj kaj aliaj vidindaĵoj. Oni eĉ povis flugi al Gronlando.
Entute sukcesa kaj tre bela kongreso, nia ligo estas sur bona vojo.

*Rolf*

**LSG BEZONAS VIN!**

## MESAĜO DE OSMO BULLER

La 98-a UK en Rejkjaviko ĵus finiĝis kaj mi volas ne forgesi gratuli al LSG pro la renkontiĝo, kiun ĝi okazigis tie kun la organizo Samtökin '78.
Tiaj renkontiĝoj en UK-oj estas modelo, kiun ankaŭ aliaj fakaj asocioj devus sekvi. Bedaŭrinde temas ankoraŭ pri escepto anstataŭ regulo. Do, dek poentojn al LSG!

*Osmo Buller*
*ĝenerala direktoro de UEA*

## REZOLUCIO DE LSG

La ĝeneralkunveno de Ligo de Samseksamaj Geesperantistoj esprimas grandan ĝojon pri la socia kaj jura situacio de la GLAT-personoj en la kongreslando de la 98-a Universala Kongreso de Esperanto. Islando troviĝas en la avangardo de la landoj kiuj serioze strebas al respekto de la homaj rajtoj sendepende de seksa orientiĝo kaj seksa identeco.
En la jaro 2010 la islanda parlamento Alþingi unuanime akceptis la leĝon kiu ebligas interedziĝon sendepende de la sekso de la partneroj. La samseksaj kaj aliseksaj paroj ĝuas la samajn privilegiojn, sed ankaŭ devojn, fariĝante tiel vera kaj respektata parto de la islanda socio. Unu jaron pli frue Jóhanna Sigurðardóttir fariĝis la ĉefministro de Islando – ŝi estis la unua malferme samseksema persono en la mondo kiu okupis postenon de ŝtata ĉefministro.
Nian apartan admiron vekas la sintento de la urbestro de Rejkjaviko, Jón Gnarr, kiu senhezite montras sian subtenon al la gejaj rajtoj. Kiam la urba konsilantaro de Moskvo rezoluciis pri la malpermeso okazigi en la urbo Gejan Fieron dum la proksimaj cent jaroj, Jón Gnarr estis la unua politikisto kiu reagis kaj kondamnis tiun skandalan decidon. Ĝuste tial en julio 2013 li proponis ankaŭ retiri la partnerajn kontaktojn kun Moskvo, la ĝemelurbo de Rejkjaviko. Ĉiujare li ankaŭ partoprenas en la rejkjavika Geja Fiero, kio bedaŭrinde ankoraŭ ne estas kutimo de la urbestroj en la tuta mondo.
Ni esperas, ke aliaj landoj kaj urboj sekvos tiujn belajn ekzemplojn por igi la mondon pli justa kaj feliĉa – por ĉiuj, sendepende de seksa orientiĝo kaj seksa identeco.

*Rejkjaviko, la 21-an de julio 2013*
*Ligo de Samseksamaj Geesperantistoj*



*Jón Gnarr, urbestro de Reykjavik*

# REDAKTANTO POR 10 SEMAJNOJ

La ĉeestantoj de nia ĉijara jarkunveno eble miras, ke tiu ĉi Forumo 148 estas farita de nia ĝisnuna provizora redaktanto Wolfgang el Kopenhago. Li havis en la lastajn du jarojn malmulte da tempo kaj tial en 2011 nur estis preta, esti nia provizora redaktanto kaj serĉis helpantojn. Ni do ankaŭ en Rejkjaviko serĉis helpantojn por li aŭ tute novan redaktanton. La jarkunveno tre ĝojis, ke John Dumas el Usono sin proponis kaj deklaris, ke li volas esti la nova redaktanto. John kaj mi interkonsentis, ke ni priparolu la detalojn.

John kaj mi do du tagojn poste dum duona horo ĉe kafo diskutis la estontecon de Forumo. Li strikte malakceptis esti helpanto kaj volis tute sole fari nian membrofolion future. Ni interkonsentis. Li havas liberan manon por pretigi la novan Forumon. Ĝi nur restu en la nuna formato, do A5, kaj memoru en la kapo al nia ĝisnuna LSG-Forumo. John diris, ke li volas tre multe plibeligi la gazeton per profesia programo ktp.. Mi future ricevos ĝin en pdf-formato por plia distribuado. Pri la unua lia numero ni interkonsentis pri aperigo fine de septembro.

Unu monaton poste, fine de aŭgusto, venis retmesaĝo de John, ke Forumo 148 estas duonpreta kaj ke Forumo 149 aperos antaŭ jarfino. Krome li skribis, ke li volas kuntranspreni la sekretario-taskojn de kopiado kaj sendado de Forumo al la membroj kaj de Koresponda Adresaro kaj de la Listo de Gastigantoj, do la kompletan adresaron de LSG.

Mi dankis lin pro lia ĝisnuna laboro kaj respondis, ke ni ambaŭ restu ĉe tio, pri kio ni interkonsentis. La membrolisto de LSG estas konfidenca kaj nur akirebla por la sekreatrio, inter alie pro kaŝaj membroj. Li koncentrigu al la redaktanta laboro. Mi sendis al li kvar artikolojn kaj de Wolfgang li ricevis multe da materialo. John respondis al neniu.

Fino de septembro bedaŭrinde ne venis Forumo. En oktobro mi memorigis John pri siaj multaj promesoj kaj demandis denove, ĉu mi povus helpi lin iamaniere, ĉu li havas iajn problemojn. Lia respondo estis, ke li nun ne plu volas esti Forumo-redaktanto. - 10 perditaj semajnoj! Prijuĝu lin mem.

Finfine mi ĝojas, ke mi sukcesis Wolfgang denove aktivigi kaj ke ni nun havas spertan redaktanton, kiu vere laboras kaj laboros kaj ne nur produktas varman aeron. Tamen li ankoraŭ bezonas vian kunlaboron kaj kontribuojn… *Rolf (sekretario)*

Rimarko: La redaktanto vane petis opiniesprimon de John.

* * *



## EFEMERA REDAKTISTO - PROVIZORA REDAKTANTO

Karaj legantoj, ne nur vi, sed ankaŭ mi profunde miras pri tio, ke mi nun denove redaktas la aferojn de FORUMO. En Kopenhago mi jam sciis, ke mi ne povus mobilizi sufiĉe da tempo kaj energio por transpreni la gravan postenon esti redaktanto de FORUMO. Mi ja konsentis esti membro de redakcia teamo. Sed mi devis rapide kompreni, ke tiu teamo neniam bone funkciis, eĉ neniam estiĝis. Kaj fine la tuta laboro gluis ĉe mi.

Estis por mi granda ĝojo, ke profesiulo pretis transpreni ĉion, tiel senŝarĝante min de malamata devo. (Pri ties malapero vi legas aliloke en tiu FORUMO.) Mi bedaŭras, ke la profesiuloj en nia ligo cedas la laboron al amatoroj, ĉar estante amatoro mi nur povas liveri amatorecan laboron. Tia tamen estas nia tradicio.

Mia situacio feliĉe ŝanĝis kaj nun mi esperas garantii regulan aperigon de tiu bulteno.

Se vi havas emon por fari ion utilan laboron por kaj pri Forumo, tiam nepre kaj senprokraste skribu e-poŝton al laredaktanto@gmx.de aŭ al la helik-poŝta adreso de la sekretario.

Dume mi dankas al la liganoj por la fideleco al la ligo, kvazaŭ kiel al partnero. Tio estas ĝojiga aspekto, ke la plejmulto de la liganoj ne forkuras en tempo de krizo.

Finfine io tute alia: De tempo al tempo estas argument, ke FORUMO aperu nur en la reto. Al mi ŝajnas, ke tio estas fari la duan paŝon antaŭ la unuan, ĉar ankaŭ en la reto FORUMO ne verkas sin mem. Krome estas tiuj liganoj, kiuj ne havas liberan aliron al la reto. Kaj mi ankaŭ opinias, ke estas necese havi ion de la Ligo en la manoj kaj ne nur sur la ekranoj.

*W*

## PRI NIA EKSA PREZIDANTO JOHN WELLS

Eble multaj el vi - kiel mi - ŝokiĝis kiam venis la novaĵo, ke nia iama prezidanto John Wells suferis apopleksion. Intertempe John preskaŭ resaniĝis. Jen lia mesaĝo por la liganoj.



*John Wells festis en 2013 la 45an datrevonon de kuneco, la lastaj sep kiel civilpartneroj laŭ brita juro*

Dankon: mi bone resaniĝis post mia pasintjara apopleksio (cerb-atako). Mi povas paroli, mi povas libere moviĝi. Restas nur ioma malforto kaj mallerto ĉe mia maldekstra mano. Mi eĉ faris sukcesan prelegvojaĝon al japanaj kaj ĉinaj universitatoj en novembro. Mia partnero Gabriel akompanis min: kredeble la ĉinoj opiniis, ke li estas ia


flegisto; sed ne gravas! Ĉi-jare mi jam vojaĝis al Karibio (dufoje), kaj al Ekvadoro (Galapag-insuloj); kaj nun mi estas en Sud-Afriko. Do ĉio iras tre bone.
Saluton al ĉiuj LSG-anoj!

*John*

## SAMSEKSAJ PAROJ ANTAŬ LA ALTARO

Kiel pastro kaj LSG-ano (LSG-numero 200) mi legis kun intereso la artikolon "Samseksaj paroj antaŭ la altaro" en Forumo 147. Mi pastras de post 2004 en la diocezo de la "Katolika Episkopo de la Prakatolikoj de Germanio". Ni estas agnoskita memstara katolika eklezio de post 1873, post kiam en la Unua Vatikana Koncilio la Papo Pio IX en la jaro 1870 proklamis sian "Nepovecon Erari" en kredaj aferoj. Tiam multaj katolikaj pastroj en Germanio, Aŭstrio, Svislando kaj Nederlando ne sekvis la novan dogmon, kaj pro tio devis rezigni pri Romo kaj formis propran sinodecan eklezion, kiu de post 1889 estas en unio kun la Eklezio de Utreĥto kaj havas de post 1931 interkomunion kun la Anglikanoj (Eklezio de Anglio), de post 1965 kun la Episkopaj Eklezioj de Hispanio kaj Portugalio kaj kun la Katolika Eklezio de Filipinoj, de post 1985 kun Evangelia-Lutera Eklezio de Germanio. Ni estas malfermita, ekumena eklezio kaj flegas ankaŭ fratan dialogon kun la ortodoksa kaj eĉ la romkatolika eklezio. Romo agnoskas la ordinadon de niaj pastroj, malgraŭ ke ni ne akceptas la jurisdikcion de la Papo.

De post 1996 ni havas ankaŭ pastrinojn, kaj de post 1997 ni disponas edziĝan liturgion por samseksamantoj. Por niaj pastroj jam de ĉiam ne validas deviga celibato kaj ili povas edziĝi aŭ ne - kaj vivi samseksame. Samseksamaj, ambaŭseksamaj kaj trans-seksemaj virinoj kaj viroj estas bonvenaj ĉe ni same kiel aliseksamaj. Sekseco estas por ni esprimo de natura inklino kaj homa amo. Samseksamo kiel aliseksamo ne estas demando pri seksaj praktikoj sed parto kaj formo de tuteca amo.




La romkatolika samseksamo-fobio ne estas honesta, ĉar oni kredas ke inter 25 kaj 40 % de la romkatolikaj pastroj estas gejoj, kaj estas publika sekreto ke la antaŭa papo Benedikto la 16-a mem estas samseksema, kvankam kelkaj supozas ke li eble estas senseksa, kaj multaj vidas lin viro kun inseksa vefto.

En la prakatolika klerikaro la procentaĵo de samseksamantoj estas proksimume 6-8%, nur iomete pli granda ol en averaĝa populacio – la majoritato de niaj pastroj estas iamaj romkatolikaj pastroj kiuj volis edziĝi.
Evidente multaj nuntempaj teologoj ne konsideras samseksamon peko kaj tute ne kontraŭas samseksamon. En la pasinteco oni nur misinterpretis kelkajn bibliajn citaĵojn kiuj klarigendas el la ĝenerala tiama kulturo kaj neniele vere kontraŭas samseksamon. De Jesuo ne ekzistas eĉ nur unu vorto kontraŭ samseksamo. Jesuo nur diris ke Dio mem estas amo kaj ke amo estas la plej granda ordono Dia – "kaj pli facile putinoj eniras la ĉielon ol fariseoj" (Mateo 21,31). Kelkaj aŭtoroj kiel Klaus Dede kredas ke Jesuo mem eble estis gejo. Fakte ni legas en la Evangelio ke Jesuo amis siajn disĉiplojn (Joh. 13, 34), precipe la plej junan, Johanon, kiu kuŝis je la Lasta Sankta Manĝo je la brusto aŭ sino de Jesuo (Joh.13, 23) kaj plorante staris apud la kruco (Joh 19, 26 - komparu ankaŭ Joh. 20,2 kaj 21, 7-20-24, kaj Chromatius de Aquileia: "Johano estis la plej juna el ĉiuj disĉiploj de Kristo, la plej juna laŭ aĝo" - Sermo II,1 "De Sancto Iohanne Evangelista", CCL 9a,101). Alia stranga verso restis en la Evangelio laŭ Marko, 14, 51/52, kiam Jesuo estis kaptita en Getsemane: "Sekvis lin junulo, vestita per tolaĵo ĉirkaŭ la nuda korpa, kaj kiam oni volis kapti lin, li forkuris nuda, lasinte la tolaĵon." Ĉar mankas aliaj detaloj la teologoj dum jarcentoj diskutis pri la identeco de tiu junulo, kiu eble estis Johano aŭ la riĉa junulo (Marko 10, 7-22) aŭ la junulo je la tombo de Jesuo (Marko 16,5) aŭ Lazaro (Joh. 11, 35/36 – 12, 10/11).




*Johano ĉe la brusto de Jesuo – skulptaĵo de ĉ. 1310*

Dum eklezioj ankoraŭ dancas polonezojn, modernaj ŝtatoj jam komencis krei leĝojn pri "vivopartnereco". De post la 1-a de aŭgusto 2001 en Germanio virinoj rajtas "edziniĝi" kun virinoj, kaj viroj "edziĝi" kun viroj. La germana vorto por edz(in)iĝi estas "heiraten", kiu etimologie devenas de "Hausrat", establi "Haushalt", komunan mastrumaĵon. Tio kompreneble ne necesigas seksan polusecon. La

koncerna leĝo ne senvalidigas la tradician edzecon, kiu celas fondadon de familio kun ŝtate instigata generado kaj eklezie reguligata seksumado. La tielnomatan "vivopartnerecon" mi konsideras viva partnereco, atingo de racio kaj venko de amo super unuflanka seksumemo. Evidentas ke la institucio familio bezonas specialan protekton. Plej simpla kaj justa modelo por tio estus, se por ĉiu infano en geedzeco oni ricevus monatan pagon. Sed kiom da geedziĝoj hodiaŭ vere celas familion kun infanoj? Kaj kial vivopartnereco suferu malavantaĝon kompare kun geedzeco? Ekzistas tiom da geedziĝoj sen infanoj, sen la celo aŭ sen la ebleco havi infanojn. En la intereso de la publika bono, oni devis kaj devas gratifiki ne nur la familion, sed ankaŭ du partnerojn samseksajn, kiuj pro reciproka amo kaj laŭleĝe volas zorgi unu pri la alia.

En Budhismo kaj en Kristanismo ĉiam ekzistis samseksaj monaĥejoj – aŭ nur por virinoj aŭ nur por viroj. Ekleziaj lernejoj kaj internulejoj ĝis la 20-a jarcento estis aŭ por knaboj aŭ por knabinoj - ne ekzistis geknaba edukado. Kompreneble tio favoris kaj nutris ĉiam samseksajn rilatojn – kontraste al tradicia eklezia diskriminacio de tiaj kaj pluekzista diskriminacio de ĉio priseksa. Tamen la frua kristana eklezio eĉ kanonizis ankaŭ samseksajn parojn, ekzemple la sanktulojn Sergius kaj Bacchos, Perpetua kaj Felicitas. Antaŭ ĉio la grek-bizanca eklezio konis ĝis la 19-a jarcento la "adelphopoiesis" (interfratiĝo), la mezepoka romkatolika eklezio simile "ordo ad fratres faciendum" (rito de interfratiĝo) – ambaŭ ritoj por vivopartnereco, por benado kaj konsekro de kunvivado, por pariĝo samseksa.



Mi citas el historia rito kaj preĝo: Akolouthia eis adelphopoiesin (Ceremonio religia por interfratiĝo): "... benu kaj konsekru, aminda Sinjoro kaj bonkora amanto, ĉi viajn servistojn, kiuj amas unu la alian kun amo de spirito (tous pneumatike agape heautous agapesantas), kiuj venis en ĉi vian sanktan preĝejon por esti benitaj kaj konsekritaj. Donu al ili malferman fidon (pistis) kaj sinceran amon (agape anhypokritos) (Komparu ankaŭ “The Ceremony of Brothermaking” (IV) en “Same-Sex Union”, John Boswell, NewYork, Villard, 1994). Similajn ceremoniojn konis ankaŭ la Templanoj. La paragrafo 19 de la kodo de la prakatolika "Congregatio Divini

Salvatoris", CDS - Ordre de Port-Royal" deklaras ke ĉiuspeca diskriminacio de sekso kaj seksa orientiĝo estas peko kontraŭ Dio. En la prakatolika eklezio samseksaj paroj kredantoj povas ricevi ĉiujn sakramentojn, kaj kio validas por la kredantaro, tio validas same por la klerikaro: Samseksemuloj povas ricevi la sakramenton de ordinado, estiĝi sacerdotoj kaj eĉ episkopoj. Seksa orientiĝo ne estas kriterio por servado en la eklezio, nur la kapabloj fakaj, homaj kaj spiritaj.
Dum la lasta Christopher Street Day (CSD) nia paroĥo havis standon por informi pri nia sinteno, kiu estis tre bone akceptita, des pli ke unu el niaj samseksaj paroj, junaj natursciencistoj, tre ĉarme alparolis la vizitantojn. Persone mi opinias ke CSD por la samseksemulaj rajtoj, por la ĝenerala geja afero, fakte estas malfavora evento – sed nia stando estis vere serioza kaj digna, kulmina. La organizanta teamo decidis ke nia stando kaj tiu de Amnestio Internacia estu antaŭ la portalo de la katedralo katolika. Do ankaŭ multaj romkatolikoj diskutis kun ni – kaj sinjorino diris al sia edzo: "Miru, trezoro, ili ja atingis jam ĉion, kion ni atingos nur post unu aŭ du papoj. "
Lasta punkto de ĉi tiu respondo al la artikolo en la lasta Forumo: "La ŝtata eklezio de Anglujo", do la Anglikanoj, ne tiom kampanjas kontraŭ ni, ĉar la ĉefepiskopo de Canterbury, Rowan D. Williams, primaso de ĉiuj Anglikanoj de 2003-2012, kun kiu mi jam renkontiĝis en aŭgusto 2006, multfoje pledis por toleremo pri samseksamo, por benado de vivopartnereco, kaj ankaŭ favoris ordinadon de virinoj. Sed, ja li suferis multe da rezisto pro ĉiuj afrikanaj episkopoj.
Kaj lastatempe ankaŭ la "Norda Katolika Eklezio" de Norvegio, kiu funkcias de post kelke da tempo ankaŭ en Germanio, Pollando kaj Kanado, bedaŭrinde forte kontraŭas samseksamon kaj benadon de vivopartnereco – sed mi konas 4 el iliaj germanaj reprezentantoj, kiuj mem estas gejoj - falsaj fratoj, fariseaj pastroj! Fi! Fino!

*LSGano 200*



VIGLIGU FORUMON!

# TRA LA MONDO

## NOTARIINO REGISTRIGAS TRI-HOMAN PARTNERECON EN BRAZILO

Notariino en la brazila federacia ŝtato São Paulo permesis la gepartneriĝon de du virinoj kaj unu viro. Kiel raportas "Noticias BR", la vivo-partnereco estis registrita jam antaŭ tri monatoj en la universitata urbo Tupá, sed nur nun incitas la animojn en Brazilo. La partneriĝa triopo, kiu ne donas intervjuojn, jam tri jarojn en Rio de Janeiro vivis kune kaj interplektis siajn vivojn. Al tiu stato ekzemple apartenis komuna bankokonto.

Notariino Claudia do Nascimento Domingues argumentas, ke la konstitucio ne malpermesas, ke pli ol du plenkreskuloj povas vivi kune kiel familio. La difino de la vorto "familio" dumtempe tiom multe ŝanĝiĝis, ke ĝi ne plu nur povas signi duopajn rilatojn. Ĉar neniu el la tri partneroj estas edziĝinta, la tri koncernatoj nur per vivo-partnereco povas daŭre asekuri sian familion, diras la notariino, kaj ke tiu pli granda familio havas la rajton kaze de disiĝo aŭ morto esti asekurata.

*Jurista disputo*

Nun la juĝejoj devas decidi, ĉu tia partereco estos agnoskebla. En la brazilaj komunikiloj multaj advokatoj aŭdigas sin, kiuj deklaras tiun paŝon nelaŭleĝa, ĉar laŭ la nuntempa leĝo nur dupersonaj rilatoj estas enkoditaj. Ankaŭ kristanaj grupoj protestas kontraŭ la larĝigo de la nocio "familio" kaj anoncis plendojn.


La notariino inter alie sin apogis je tio, ke en pasintaj jaroj samseksaj paroj povis estigi registritajn partnerecojn, eĉ se al ili estis rifuzata la priedza leĝaro. En Brazilo ekde juĝeja decido el la jaro 2004 ekzistas por gegejoj la ebleco establi vivo-partnerecon.

Intertempe la malfermon de la edziĝo por samseksaj paroj estas ade diskutata. Jen juĝejo en 2011 unuafoje decidis, ke la edzeco de lesba paro devas esti agnoskata. La juĝistoj tiam deklaris, ke "la seksema orientiĝo ne rajtas esti preteksto por ekskludi familiojn de la jura protektado, kiun ofertas la edzeco". Ili eksplizite apogis sin sur la konstitucio, en kiu eksplicite estas malpermesata diskriminiacio.

*Bernvardo*

## UGANDA MALPERMESAS GEJAN TEATRAĴON

En Ugando la prezentado de teatraĵo pri geja komercisto estis malpermesata per la kontrolaj instancoj.



La teatraĵo "The river and the mountain" (la rivero kaj la monto) estis unuafoje prezentita en malgranda teatra salono en la ĉefurbo Kampala. Nun la administracio malpermesis pluajn prezentadojn, raportis la brita gazeto "Guardian". "Surprizo estis, ke ni ne ricevis klarsignifan kaŭzigon", deklaris la aktoro Okuyo Joel Atiku Prynce.

La teatraĵo temas pro 29-jarulo, kiun lia patrino volas stiri en la havenon de edziĝo. Ŝi elspezas monon por malgejigi lin per kristanaj predikistoj aŭ ŝamanumaj sanigistoj. La teatraĵo montras, kiel la juna viro adaptumas sian vivon en gejmalama medio.

Ugando apartenas al la plej homofobaj landoj en Afriko. Homoj pro samseksemo riskas puniĝi per dumviva malliberejo. La registaro volas eĉ akrigi la leĝojn kaj akuzas gegejon, ke ili intence delogas infanojn. Kelkaj delegitoj agumas eĉ pro la enkonduko de mortpuno por certaj samseksaj "deliktoj". Antaŭ mallonge la ministro por etiko Simon Lokodo nomis gegejojn "malbonegaj homoj"

*Bernvardo*

## GRANDA BRITIO VOLAS MAL-VALIDIGI JUĜOJN KONTRAŬ GEJOJ


En Granda Britio gejoj, kiuj estis kondamnitaj pro sia samseksemo ĝis dum la 1960aj jaroj, nun povas apelacii por malvalidigi sian jampunitecon.

Kiel la "Guardian" raportas, per tio ĉiuj kondamnoj pro interkonsenta amoro inter viroj povas nun esti deklarataj kiel malvalidaj. Granda Britio malvalidigis la puneblon de samseksemo en Anglio kaj Kimrio en 1967 (en Skotlando kaj Norda Irlando la leĝo restis ĝis la 1980-aj jaroj). La kondamnitaj viroj tamen validis kiel jampunitoj, kio povis konsekvenci profesiajn malavantaĝojn.

Bazo de la malvalidigo estas la jam proklamita "Protection of Freedoms Act 2012" (leĝo pri la protekto de liberecoj 2012). Ekde oktobro, punitaj gejaj viroj povas meti siajn apelaciojn, kiuj estos taksitaj de aferprilaborantoj. Se la viroj nur estis kondamnitaj pro interkonsenta amoro, la apelacioj devos esti akceptataj. Sed la rajto je rekompenco por la kondamnitoj ne estas leĝe menciita.

*Germanio malforigas la kondamnojn.*

En Germanio male la kondamnoj de gejaj viroj validas plu. En tiu federacia respubliko la fifama paragrafo 175 nur en 1969 estis malakrigita. De tiam interkonsentaj amoraj rilatoj inter plenkreskaj viroj ne plu estas puneblaj. La praa Germanda Demokratia Respubliko punendis samseksemon inter plenkreskuloj ĝis 1968. Dum la juĝoj de la naziaj juĝejoj estis malvalidigitaj jam en 2002 de la ruĝa-verda koalicio, la postnazitempe kondamnitaj gejoj male plu validas kiel jampunitoj.



Dum la lastaj jaroj ekestis pli fortaj streboj rehonorigi ankaŭ tiujn virojn. Ekzemple la ruĝ-nigra registaro de la lando Berlino ja agitas por viktimoj de la § 175 en la landara konsilantaro. Sed deklaris nigraj-flavaj federaciaj politikistoj de CDU/CSU kaj FDP, ke la juĝoj fariĝis laŭ jurŝtataj procesoj – kaj ke pro la "jura stabileco" oni ne rajtas malvalidigi ilin.
Ankaŭ la SPD tiam anoncis "skruplojn pro konstitucia jureco". (rim: ruĝa SPD socialdemokrata; nigra CDU/CSU konservativa, flava FDP (neo)liberala)
En Granda Britio la temo de la persekuto samseksemulojn glitis en la kapliniojn gazetarajn pro la 100. naskiĝmemoro de la kodo-hakanto Alan Turing. Dum al dua mondmilito Turing pro sia malsekretigo de enkoditaj germanaj radiomesaĝoj esence helpis la venkon de la alianco super la Germana Regno. En 1952 oni akuzis lin pro samseksemo kaj kondamnis – du jarojn poste li memmortigis sin. Jam en 2009 la tiama ministrestro Gordon Brown petis senkulpiĝon pro la ŝtata persekuto de la matematikisto.

*Bernvardo*

## POLLANDO PLANIS REGISTRITAJN PARTNERECOJN

La dekstra-liberala registaro en Varsovio volas nun ja meti antaŭ la parlamenton leĝproponon por enkonduki registritajn partnerecojn.
La delegito Arthur Dunin de la reganta civitana forumo (PO) anoncis, ke la leĝpropono post mallonga tempo estos metata antaŭ la parlamenton. Dum intervjuo kun la ŝtate agnoskita radioelsendejo "PR1" Dunin eksplikis, ke la leĝo tamen nur enhavu limigitajn rajtojn, por distingi ĝin de la malgeja geedziĝo. "La diferencoj al la geedziĝo estas tre gravaj por ni", diris Dunin.
Laŭ ĝi gegejaj paroj ekz. ne estu samrajtaj rilate la leĝoj pri impostoj je enspezoj kaj pri adopti infanojn. Samrajte ili estu traktataj tamen en la regionoj de impostoj je heredaĵoj kaj de la rajto rifuzi atestojn kontraŭ la partner/in/o. Per tio la plej urĝaj problemoj de samseksaj paroj estu solvataj, sen tropostulumi la propran konservativan partion, tiel Dunin. La vivo-partnereco ankaŭ estu malferma por malgejaj paroj. La leĝpropono postulus la ŝanĝon de pluraj dozenoj da leĝoj.

*Interpartia disputo jam programita*


La opozicio estas disfendita teme de samseks-leĝoj. Dum la socialdemokratoj kaj la maldekstra-liberala Palikot-movado postulas la agnoskon de samseksaj paroj, la nacia-konservativan partion "juro kaj justeco" (PiS) oni taksu ĝisfundan malamikon de la samrajtigo – jen PiS-delegito antaŭ mallonge avertis "gejan faŝismon".
La konservativa alo de la civitana forumo same opinias malfavore pri samseks-rajtoj. Nur en la lasta monato la civitana forumo malakceptis proponon de la socialdemokratoj kaj de la Palikot-movado je agnosko de samseksaj partnerecoj. La ŝtatprezidento Bronislaw Komorowski kaj la ministrestro Donald Tusk (ambaŭ de la civitana

forumo) ĝis nun nenion diris pri la planita leĝpropono.
Samseks-kontraŭuloj kaŭzigas siaj rifuzon per la pola konstitucio, kiu difinas geedzecon kiel ligon inter unu viro kaj unu virino. Konservativaj politikistoj kaj la katolika eklezio argumentas, ke pro tiu kaŭzo ĉia agnosko de samseksaj paroj estus kontraŭkonstituciaj. Pro tio ili esprimis kontraŭ la enkonduko de "pseŭdo"-geedzeco.

*Bernvardo*


## ZIMBABVO FERMIGAS GEGEJAN CENTRON

La situacio por gegejoj en Zimbabvo fariĝas ĉiam pli severa. Robert Mugabe regas Zimbabvon jam dum tri jardekoj kaj famas kiel plej granda malamanto de gegejoj en Afriko. Nun la polico fermigis la buroon de la gegeja grupo "Gays and Lesbians of Zimbabwe (GALZ)" La buroo en la ĉefurbo Harare estis la ununura centro, kiu konsilis al seksualaj minoritatoj je juraj kaj sanecaj demandoj.



La polico argumentis, ke la grupo laboras mallegale, ĉar ĝi ne lasis sin registri kiel sendependa bonfara organzio ĉe la instancoj. La oficistoj tial konfiskis la en la buroo trovitajn komputilojn, stokiletojn kaj informajn materialojn.
La organizo malgraŭe volas defendi sin kontraŭ la malpermeso, ĉar gi estis aktiva jam dum dek jaroj kaj povis sin apogi je la rajto de kutimo, deklaris la advokato Tonderai Bhatasara al la gazeto "The Zimbabwean". "Laŭ la leĝo de Zimbabvo ne estas mallegala esti geja aŭ lesba. Nur se viro fakte amoras kun alia viro, la afero estiĝas mallegala", tiel Bhatasara. Li akuzis la politikan gvidantaron, ke ili volas fari pekantojn el gesamseksemuloj.
Jam du semajnojn pli frue la polico, armita per batbastonoj, ŝturmis la buroon kaj arestis 44 aktivulojn. Ĝis nun ne estis metita oficala akuzo kontraŭ tiuj viroj kaj virinoj. Ĝis nun tute ne estas klare la riproĉo, kontraŭ kiuj leĝoj ili pekis.
Aliflanke la landaj leĝoj kontraŭ samseksemo estas tre difuzaj. Laŭ ili eĉ "maldecaj agoj" kiel ekz. samseksa man-en-mano aŭ ĉirkaŭbrakumoj povas esti taksataj kiel krimoj kaj povas esti punataj per plurjara malliberejo. Plie, la registaro sub Robert Mugabe dum la lastaj jaroj ĉiam denove iniciatis kampanjojn kontraŭ gegejoj kaj i.a. akuzis ilin esti agentoj de la eksaj kolonialaj ŝtatoj.
Zimbabve havas lokon inter la mondskale plej malriĉaj landoj kaj de jaroj batalas kontraŭ mis-ekonomio kaj katastrofoj de malsato. Krome ĉirkaŭ unu sesono de la enloĝantoj estas HIV-pozitiva – kaj en la lando ne ekzistas amora klerigo por viroj amorantaj virojn.

*Bernvardo*




## NOV-ZELANDO: PARLAMENTO VOĈDONAS POR MALFERMI LA EDZECON

Per 80 kontraŭ 40 voĉoj la nov-zelanda parlamento voĉdonis por la malfermo de la edzeco ankaŭ al gejoj kaj lesboj.


Je la "Marriage (Definition of Marriage) Amendment Bill" (edziĝo (difino de edziĝo), propono de aldonaĵo) la partioj en la parlamento forigis la delegitan katenon al la propra frakcio, ĉar ja temis pri demando de konscienco. La leĝpropono estis metita far la demokrata Labour-delegitino Louisa Wall. La leĝon ŝi nomis kontribuon al la civilaj rajtoj: "Estas konata, ke la leĝo kreos samecon inter la plenkreskuloj rilate al la edziĝa juro. Bazoj estas la principoj de la amo, ĝusteco kaj de samaj ŝancoj por ĉiuj civitanoj nov-zelandaj."

Ankaŭ la konservativa ministrestro John Key dum la lastaj monatoj unuafoje pledis por la samrajtigo en la edziĝa juro. En majo li estis deklarinta, ke li persone "havas nenion kontraŭ la malfermon de la edzeco". La gazetaro trovis la kaŭzon de lia ŝango de opinio en la pozicio de usona prezidento Barack Obama, kiu unu tagon antaŭe simile pledis unuafoje por la malfermon de la edzeco.

*Plurmonataj interkonsiladoj*

Ĵus antaŭ la proklamo de la leĝo pli ol 1000 gegejaj aktivuloj demonstraciis antaŭ la parlamento en Wellington por la malfermo de la edzeco. La leĝo nun estos pridiskutata en komisiono kaj devos prezentati al publika pridemandado. Tio povos daŭri kelkajn monatojn. Ankoraŭ eĉ estas neklare, ĉu la konservativaj delegitoj post la diskutado ankoraŭ voĉdonos por la malfermo de la edzeco.

Jam en 2005 Nov-Zelando jam enkondukis la registritan partnerecon por gejoj kaj lesboj. Ĝi ampleksas nuntempe preskaŭ la samajn rajtojn kiel la geedzaj paroj kun la escepto de la plena juro pri adopti infanojn. Laŭ la nova leĝpropono gegejaj kaj gemalgejaj paroj estu senescepte samrajtaj.



Kontraŭuloj de la samtraktado estis antaŭ ĉio konservativaj politikistoj kaj la kristanaj eklezioj. Por ekzemplo, 70 altrangaj ekleziaj funkciuloj subskribis dokumenton, per kiu ili postulis pludaŭrigon de la malpermeso por gejoj kaj lesboj edziĝi. En ĝi ili argumentas, ke ne temas pri demando de civitaj rajtoj, sed ke la "karaktero de la edzeco" estas endanĝerita per gejoj kaj lesboj. 50.000 civitanoj aliĝis al simile formulita peticio. La publiko tamen majoritate subtenas la malfermon de la edzeco, laŭ enketoj pledas pli ol du trionoj de la Nov-Zelandanoj por la samtraktado.

Nov-Zelando estus la dekdua lando, kiu samrajtigas samseksajn parojn en la edzeca juro.

*Bernvardo*

## METROA MOMENTO

vi.

ke vi
vidu min,
nur vidu min,
kiel mi vidus vin,
se mi aŭdacus nur

vidi vin kiel
vi vidas min.

vi.
belul', vi.

(bernvardo 2012)

## GRAVA ELŜRANKIĜO EN SPORTO

La 31-jara portorikano Orlando Cruz kiel la unua boksisto de la alta nivelo malkaŝis sian samsekseman orientiĝon. "Ĉiam mi estis fiera pri mia lando. Ĉiam mi estis kaj estos fiera, ke mi estas gejo" - li diris du semajnojn antaŭ la grava batalo kontraŭ la meksikano Jorge Pazos.



*Orlando Cruz kun sia partnero*

Cruz, kandidato por monda ĉampioneco, estas nun la numero kvar sur la listo de Monda Boksada Asocio (WBA) en la plumo-peza kategorio. En 2000 li estis en la nacia teamo de Portoriko dum la Olimplikoj en Sidnejo. Lia elŝrankiĝo estas grava, ĉar samseksemo en sporto daŭre estas tabuo – tiom pli en la masklismaj sportoj, kiel boksado. En 1962 kaŝanta sian gejecon Emile Griffith mortigis en boksa areno Benny Paret, kiu antaŭ la batalo suspektigis tiun unuan pri samseksema orientiĝo. Griffith post

pluraj jaroj konfesis sian gejecon, sed faris tion – same kiel kelkaj aliaj sportistoj – nur post la fino de sia kariero, dum Orleando Cruz elŝrankiĝis mallonge antaŭ la duelo, kiu povas igi lin monda ĉampiono.

"Mi volas, ke homoj plu konsideru miajn kapablojn kiel boksisto, mian karakteron kaj mian batalemon. Sed mi ŝatus ankaŭ, ke la geknaboj, kiuj estas turmentataj de aliaj, sciu, ke oni povas fariĝi kiu oni volas, eĉ profesia boksisto. Ke ĉio estas ebla, kaj tio, kiu oni estas kaj kiun oni amas, ne devas malhelpi atingi *vivocelojn*" – li skribis en la deklaro por Boxingscene.com.

*Paweł*

## LETERKESTO

W, la nevidebla redaktantaro, skribis en "FORUMO" nr-o 147, paĝo 1, ke laŭ iaj teologoj la Biblio ne parolas pri samseksamo. Sed mi trovis frazojn en la Biblio, kiujn deklaras samseksamon kiel peko, ekz.

"Aŭ ĉu vi ne scias, ke la maljustuloj ne heredos la regnon de dio? Ne trompiĝu: nek malĉastuloj, ... nek viruzaĉantoj... heredos la regnon de dio." (La unua epistolo de la apostolo Paŭlo al la korintanoj 6:9,10.)

*Ulrich*

Mallonga respondo: Aliloke en tiu FORUMO vi jam havas respondon de teologo, kiu metas la referencojn de la Biblio en pli vastan kontekston.

Bonvolu rimarki, ke Paŭlo en sia letero ne uzas iun samtempan vorton por samseksa amoro, sed inventas novan vorton (arsenokoites) kaj ne difinas ĝian uzon. Neniam en antikva tempo tiu vorto havas la signifon 'samseksemo' laŭ nia nuntempa kompreno. Konsekvence 'viruzantaĉoj' apenaŭ inkluzivas la signifon 'samseksemo', eĉ se iuj novaj versioj tradukas tiel.

Entute: la referncoj al samseksemo en la Nova Testamento malabundas, ko,mpare kun pli drastaj kondamnoj de ekonomiaj krimoj (vidu ekz-e en la letero de Jakobo 5:1-5).

*W*

## DAVID BERGER – GEJA KATOLIKA TEOLOGO

Pere de amaskomunikiloj mi lernis pri la geja katolika teologo David Berger. 2012 li eldonis sian aŭtobiografion "La sankta ŝajno - Kiel geja teologo en la katolika eklezio"



*David Berger – geja katolika teologo*

David Berger naskiĝis 1968 en la sudgermana urbo Würzburg. Kiel knabo impresis lin la ritoj, la belaj roboj, la preĝejoj kun belaj dekoracioj, la solenaj aranĝoj kun la gloranta muziko, la liturgio en la sekreta latina lingvo.

Tiu tuta artaĵo entuziamigis lin kaj vekis ardan deziron aparteni al la estimatuloj.

Tial David studis teologion, filozofion kaj germanistikon ekde 1989. En la sama jaro li konatiĝis kun simpatiulo kaj ili enamiĝis. En kapeleto de Würzburg ili promesis fidelecon unu la alian. Ili vivas kune hodiaŭ ankoraŭ.

David decidis fariĝi instruisto de religio.

Post studado li verkis disertaĵon pri la rilato inter naturo kaj graco.

Li okupiĝis private kun la mezepoka filozofo kaj teologo Tomaso de Akvino. Pri Tomaso David verkis sciencan verkon.

Ekde tiam David estis agnoskita kiel specialisto pri Tomaso.

Sentenco de Tomaso fascinis Davidon aparte: "Neniu estus pli bona ol la aliulo, se li ne estus amata pli de Dio."

Tio instigis Davidon ascendi en la eklezia hierarkio.

David eklernis multajn gejojn inter la funkciuloj de katolika eklezio. Ĉar la celibato validas por pastroj kaj gemonaĥoj, multaj sublimadas sian seksecon per laborado kaj sindonemo. Kelkaj serĉas kunulojn, eĉ inter infanoj Episkopo, kiu fifamiĝis lastjare, aproksimiĝis al juna pastro kaj flirtis kun li.

La junulo ekfuĝis.

La episkopo diris:" Restu: mi bezonas vian amon!" La juna pastro diris: "Pastra moŝto, mi ne estas geja."

La episkopo ridetis kaj respondis: " Mi ja ankaŭ ne."

Post la studado David Berger estiĝis redaktanto de katolika revuo. Per prelegoj en religiaj seminarioj li famiĝis. Ekleziaj funkciuloj invitis lin regule je babilrondoj. La sinjoroj moketadis pri gejeco en la eklezio kaj en la "mondo". Sed kolere ili insultis pri publikigo de tiu "malvirta perverseco". David ekrimarkis: se oni estas geja, oni silentu mimimume, por ke la "sankta ŝajno" estu savita. Sed la nocio "perverseco" estas ankaŭ uzebla kiel subigilo. En dusignifaj dialogoj ia estro lasas tralumeti sian ekkonon, kaj inter la linioj estas minaco:

"Se vi ne faras, kion ni ordonas, ni maldungos vin; ni ja havus kaŭzon."

Kelkaj jaroj David vivis nemolestata kun sia partnero. Kiu sciis, ke temas pri geja paro, silentadis pri tio.

En la jaro 2010 episkopo en televida diskutrondo insultegis pri samseksamo.

Krome la estro de David sinanoncis en "Facebook" kaj trovis en la profilo de David ligon al geja sportludo ("Gay Games"). Dum sekvonta tago la estro demandis akre Davidon. David nun rememoris la plej saĝan sentencon de Biblio:

"La vero vin liberigos" (la evangelio laŭ Johano 8:32) kaj konfesis. Li estis maldungita. Laŭ germana sentenco oni vivas sen ĝeno post ruinigita reputacio.

*Ulrich*

## FILMO -LIBERA FALO

La intrigo de "Libera Filmo", nova filmo de Stephan Lacant similas al la fama "Brokeback Monto". La vivo de Marc ŝajnas esti perfekta: Li havas karieron en la polico kaj lia edzino estas graveda. Dum kurso Marc renkontas Kay'on. Kay komencas aferon kun Marc. En la komenco Marc hezitas sed tiam li tamen ne povas rezisti la ĉarmon de Kay. Marc konfuziĝas esplorante sian amon al alia viro dume ilia afero okazas en plena sekreteco.



*La renkonto kun Kay (dekstre) ŝanĝas la vivon de Marc*

Iam Kay volas pli ol afero de Marc, kio estas pli ol tiu povas doni. Marc forpuŝas Kay'on, kiu poste malaperas el lia vivo. Bettina, la edzino de Marc, eltrovas, ke Marc havis aferon. Marc volas savi la edzecon, sed ĉu li povas vivi sen la amo de Kay?
Libera Falo ne estas kiel tipa geja elŝrankiĝa filmo, sed kiel filmo pri persono, kiu denove enamiĝas kaj devas sperti, ke tiu amo povas kaŭzi senliman falon
Bona filmo, kiu evitas kliŝojn kaj la senton 'Ho, mi jam vidis tion'.

*W*

## NUNTTEMPE ĈAJKOVSKI TAMEN NE ESTAS GEJO

Ĉiuj krom la rusa ministro por kulturo scias, ke la rusa komponisto Petro Ĉajkovski estis geja. En leteroj li skribis pri siaj doloroj amante virojn de distanco. Eĉ Putin, la rusa prezidento agnoskis tion en septembro: "Ĉajkovski estis gejo, sed ni tamen amas lin pro sia muziko", Putin deklaris en septembro. Sed nun Vladimir Medinski, kiu estras kulturon en Rusio opinias, ke tio estas senbaza klaĉo: "Ne ekzistas pruvoj, ke Ĉajkovski estis gejo."
Reĝisoro Kiril Serebrennikov preparas filmon pri Ĉajkovski kaj ankaŭ pri ties privata vivo kaj amdoloroj. La ministerio pri kulturo tiam ne plu subtenis la projekton, asertante ke ne estas publika intereso pri tia filmo. La filmo estu pri la genio de la komponisto kaj pri nenio alia. La reĝisoro nun klopodas trovi monon por la filmo eksterlande.
Sub la reĝimo de Putin estas kontraŭ la leĝo "propagandi netradiciajn seksajn agojn", kio inkluzivas manifesti por gejaj rajtoj kaj informi pri LGBT-aferoj. Tiu leĝo, numero 135-FZ de la 30a de junio 2013 celas protekti neplenaĝulojn kontraŭ "geja propagando".
Kritikantoj de la leĝo mencias, ke la formulo estas treege nepreciza (kio estas tiu propagando? kvazaŭ seksa orientiĝo estus elektebla laŭ iu modo). "Seksa orientiĝo ne estas infekta, sed biologia trajto kiel harkoloro." Vane kritikis Dmitri Isajev – la leĝdonantoj tamen decidis protekti la socion kontraŭ "tiuj uloj".

*W*



*Sankt Peterburgo en Ruslando, la 12an de oktobro 2013 (en la 21-a jar-cento): Junuloj survoje al karcero post manifestacio por gejaj rajtoj*




*Samseksama paro antaŭ la altaro: Jen danaj amikinoj Lise kaj Helle, kiuj edziniĝis en 2012 laŭ instigo de la loka pastrino (maldekstre)*